

Numero: 226.
Marto 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Printempo

Ho, kiom ni atendis la unuajn sunradiojn post la longa, frosta vintro!

Fine ili alvenis, kaj malvarmeta vento karesadas nian vizaĝon.

La plej bela sezono estas la printempo. Nia korpo renaskiĝas, venas novaj esperoj kaj sopiroj.



Printempe oni ĉiam refreŝiĝas, kaj la koro pleniĝas de esperoj. Kiom bone estus, se ĉiu sezono estus granda printempo, kaj ni povus esperi, ke nia mondo fine estos pli bona.

Laŭ mi ĉiuj geesperantistoj tre ŝatas printempon, ĉar la naturo verdas, kiel nia flago.



Esperanto kaj naturo ambaŭ ili estas necesaj por la homo. Sen ili ni ne povas vivi. Ilia koloro trankviligas nin kaj sugestas, indas vivo malgraŭ tio, ke nin ofte ĉirkaŭas nigraj nuboj.

Printempe promenadi sur flora kampo estas mem la plezuro. Mi estas ravita ekvidante la unuan neĝborulon, la heroldon de la varmaj tagoj. En mia koro ekflagras la flamo de la espero, ke vere la vintro estis longa kaj frosta, tamen la malhelajn tagojn superis la varmeta sunbrilo.

Ni, geesperantistoj ne ĉagrenu, se ĉiufoje Esperanto ne estas akceptita, kiel ni pensis, kaj ĝin oni atakas dirante pri ĝi stultaĵojn. Tiuj vortoj estas tiel malfortaj, kiel fine de vintro la matenaj frostoj. Kiam ekaperas la unuaj sunradioj, la tero rapide varmiĝas kaj el ĝi ekfloras bela floreto, kiu helpas forgesiĝi al ni la malbonajn tagojn.

Se oni priridas vin pro Esperanto, pensu pri naturo. Ankaŭ en la naturo ĉiuprintempe revenos la espero kaj ĉio renaskiĝos.

En iu tago alvenos ankaŭ la printempo de la internacia lingvo, ĉar ni diligente semis kaj semis. Ne timu, ke Via laboro estos vana kaj senrezulta. Ankaŭ la kamparano metante en la teron la semon scias, el ĝi naskiĝos nova vivo.

Ankaŭ d-ro Zamenhof sciis tion, kaj li kreis por ni grandiozan lingvon, kiu plifaciligos la komunikadon, se alvenos la printempo de la homaro.

Kredu kaj esperu, ĉar jam ne estas malproksime tiu ĉi brila tago!

-Redaktanto-

Tradukmaŝino

Estis mondfama inventisto, kiu jam eltrovis multe da grandiozaj maŝinoj. La homoj admiris lian scion.

Liaj eltrovaĵoj ĉiufoje plibonigis la homan vivon kaj servis la progreson.

En iu tago alvenis fremdulo. Li serĉis la inventiston.

-Bonan tagon sinjoro! – li diris – Onidire vi estas fama inventisto.

-Salut'! Eble vi pravas – salutis al fremdulon la inventisto – Kion vi deziras?

-Bonvolu fari por mi tian maŝinon, kiu kapablas traduki el kiu ajn lingvo.

-Ĉu tradukmaŝinon?

-Jes, mi deziras tradukmaŝinon, kiu povos traduki el diversaj lingvoj. La mono ne gravas. Pro tio ne ĉagrenu. Se vi sukcesos fari por mi tian maŝinon mi riĉe premios vin.

La inventisto longe cerbumis kaj fine li akceptis la proponon.

-Bone mi faros por vi tian maŝinon. Revenu post du semajnoj! Tiam ĝi estos preta.

La fremdulo foriris kaj la inventisto restis sola en sia metiejo. Li tuj komencis labori.



La du semajnoj rapide forpasis. La inventisto laboris tage kaj nokte. Apenaŭ li dormis kaj ripozis. De tago al tago li fariĝis pli nervoza. Ankoraŭ neniam okazis, ke io ne sukcesos.

Li faris multe da planoj kaj projektoj, sed fine neniu plaĉis al li aŭ la farita prototipo ne funkciis. La aparato ne estis kapabla traduki el ĉiu lingvo. Ofte ĝi tradukis mise. La lingvojn ĝi miksis.

Kio estas la problemo? Li ne komprenis. La inventisto ne trovis la solvon. Ankoraŭ neniam okazis, ke li estas senkonsila kaj li ne povas fari la menditan maŝinon.

Post du semajnoj revenis la fremdulo kaj li demandis:

-Ĉu la tradukmaŝino estas preta?

-Sinjoro, via deziro estas neebla. Oni ne povas fari tian tradukmaŝinon, kiu estas kapabla traduki el ĉiu lingvo.

-Ĉu vi konas la solvon? Kion mi faru?

La mondfama inventisto ekridetis kaj diris:

-Lernu Esperanton, ĉar ĉi lingvo malfermos ĉiun pordon kaj kiu ellernas ĝin, tiu ne bezonas tradukmaŝinon!

-Ŝaŝa-

La sekreto de kapelo

III.

Fine ili decidis iri plu por serĉi ponton. Ili jam estis tre lacaj kaj malsataj. Horoj pasis ekde la ekiro. Komence la vizito de la kapelo ŝajnis simpla aventuro. Nun ili estas en nekonata mondo kaj ili ne scias, kiel hejmeniri. Ili vagadas laŭ stranga rivero serĉante ponton.

Malrapide vesperiĝis. La suno malaperis malantaŭ granda monto. Tiam subite falis sur ilin la obskuro. Nenie estis videbla lumo. Suprenrigardante firmamenton ili ne vidis stelojn, kvankam estis klara vetero, eĉ unu nubo kovris la ĉielon.

Ili vidis nenion. Ĉirkaŭ ili timigaj bruoj aŭdiĝis, kiujn ĝis nun ili ne aŭdis antaŭe. Kvazaŭ danĝeraj sovaĝbestoj proksimiĝis al ili.

Ili ekprovis serĉi ŝirmejon por nokto, sed sur la riverbordo ne estis tia.

-Kion ni faru? – demandis la pli malalta – Ĉu ankaŭ vi aŭdas?

-Jes. Ni ne estas solaj. Proksime al ni estas io. Ĝi muĝas kaj la muĝado plifortiĝas.

-Kio okazos?

-De kie mi sciuj? Mi vidas nenion, kiel vi. En tiu ĉi damnita mondo la obskuro estas neeltenebla. Ĝi frenezigas min.

-Kial mi venis kun vi? – li esploris, kiel infano – Mi estis stultulo. Mi volas hejmeniri.

-Ankaŭ mi. Ne ploraĉu! Mi ne scias, kion ni faru. Eble ĝis mateno nia problemo solviĝos. Ni restu silente! Espereble tiu sovaĝbesto evitos nin.

-Kiel vi scias, ke ĝi estas sovaĝbesto?

-Mi scias nenion. Mi nur suspektas, ke la muĝado devenas de sovaĝbesto.

-Terure! – denove esploris la pli malalta kaj sidiĝis sur la teron.

Lin sekvis sia amiko kaj ili atendis silente. Ili plu aŭdis la muĝadon. Ĝi jam estis tute proksime al ili. La du viroj tremis pro la timo.

En la aero estis sentebla sulfuro – odoraĉo kaj post kelkaj minutoj super ili ekaperis du ruĝaj lumigantaj punktoj.

Kio ĝi estas?

Ili timegis kaj ne sciis, kion fari? Eble la monstro murdos ilin.

Ili atendis kaj atendis dume okazis nenio. Super ili plu lumis la du ruĝaj punktoj.

Ili ne rimarkis kiam ili endormiĝis. Matene suno jam brilis kaj varme karesadis la sunradioj ilian vizaĝon.

La monstro estis nenie. Ĝi malaperis kaj ili saviĝis.

-Ni saviĝis – ekĝemis la pli alta viro.

-Mi estas ege malsata. Ni serĉu ion por manĝi.

Ili ekiris, sed nenie ili trovis manĝaĵon. La tuta regiono estis senhoma kaj senviva. Vane ili rigardis la akvon de la rivero. En ĝi ne estis fiŝoj aŭ aliaj vivaj estaĵoj, per kiuj ili povus mildigi la malsaton.

Ili jam apenaŭ povis iri pro la malsato. Se post kelkaj horoj ili ne trovos nutraĵon, tiam ili malsatmortos.

Estis terure varme.

Ili devis iri plu. Ili sciis, se haltos, tiam ili perdiĝos.



Ili ne parolis, ĉar ĉiu elbuŝigita vorto estis laciga por ili. Eble ĝi estas la lasta stadio de la vivo.

El ili kiu mortos unue? Kia estos la morto, kiu baldaŭ alvenos? Eble nokte ĝin ili vidis. Morto vizitis ilin montrante, ke ĝi estas jam en la proksimo. Ĝi ankoraŭ atendas kelke da horoj, sed poste ĝi estos senindulga.

Hieraŭ ili ne pensis pri tia aventuro.

-Ni haltu! – diris la pli alta viro kaj li rigardis supren al la ĉielo – Dio mia gvidu nin hejmen kaj mi promesas ĉiutage preĝos! Mi ankoraŭ ne volas morti. Ja ni estas junaj.

La alia ekridis:

-Ĉu laŭ vi Dio aŭskultos vian preĝon?

-Jes. Dio aŭskultas la sinceran preĝon. Mi preĝas kaj petegas sincere.

-Bone, preĝu, se tiel por vi estas pli bona.

Neatendite, kiam ili preteriris monteton ili ekvidis rustan ŝipon en la dezerto. Ĝi estis forlasita kaj ŝajnis, ke jam delonge oni ne uzis ĝin.



-Ŝipo! – ili kriegis samtempe kaj ili tuj kuregis al la rusta akva veturilo. – Eble en la proksimo estas homoj.

Tiu ĉi forlasita ŝipo donis al ili denovan forton. Ili ĉirkaŭiris ĝin, eĉ traserĉis la internaĵon esperante, ke ili trovos ion.

Sed baldaŭe ili devis seniluziĝi, ĉar ĝi estis malplena. Krom kelkaj forĵetitaj, senvaloraj objektoj nenio estis ene.

Malgraŭ la fiasko ili ne malgajiĝis, ĉar ekbrilis la fajrero de la espero.

Elŝipiĝinte ili daŭris la vojon sekvante la riveron. Almenaŭ ili ne soifis, eĉ kontraŭ la ardaĵ sunradioj ili trovis ŝirmejon en la malvarmetaj ŝaŭmoj. Antaŭ ol iri plu ili baniĝis en la rivero. Ĝi estis grandioza sento. Ili feliĉe naĝadis kaj dume ili forgesiĝis pri la malsato.

Ili tute refreŝiĝis kaj jam ili ne sentis la malsaton. Oni diras, post iom da tempo alkitimiĝas al la malsato kaj oni ne sentas la grumpladon de la stomako.

**-Apáti Kovács Béla-
(daŭrigota)**

Poezio

Poemo printempa pri koro-doloro de Tom KRISTENSEN eldanigis Poul THORSEN

Kun la printempo ĉi-nokte forkuris
laca, cikatra de mi mia koro.
Tro mi uzis ĝin mismaniere
por la amoro, sovaĝo, doloro,
Vidu la lertan rimiĝon per koro-doloro!
Ĉe la vekigo en brusto juketis
rava malpleno, senkora ŝveliĝo.
Kuŝis mi kun aranea ridemo
sur la vizaĝ' en printempa heliĝo.
Vidu la lertan rimiĝon: ŝveliĝo-heliĝo!
Se ĉi-matenon printempan alvenos
al mia lito orhara in-ulo,
prenos mi ŝin en senkora feliĉo,
ĝenos neniam memora makulo.
Vidu la lertan rimiĝon: in-ulo-makulo!
Senemocie mi ridos kaj amos,
flustros, karesos, brakumos, kisigos,
sen emoci' kiel rimoj banalaj,
kiujn mi verse drivigas, disigos.
Vidu la lertan rimiĝon: kisigos-disigos!
Tamen mi scias: Revenos en majo
olda, cikatra al mi mia koro,
alta kaj kiel arbŝelo ŝirita,
fia diable pro am' kaj doloro.
Vidu la lertan rimiĝon per koro-doloro
-- denove!



Pensoj de Hendrik ADAMSON

Ĉe lamplumo mi sidas,
la fenestron skuas vent',
en koro ploras kaj ridas
nedifinebla sent'.

Ĝi estas kvazaŭ bedaŭro
je senutila viv',
je frue velkintaj laŭroj,
je ŝippere' sur rif'.

Ĝi estas samtempe ja ĝojo
je tre proksima fin',
malmulte restis de l' vojo,
mi baldaŭ ĝisiros ĝin.



Memorbildo de Georges E. MAURA

El nebulzono
de foririntaj tagoj
sin levas via bildo
kronante l' kapon per la brakoj,
ho suda,
nuda,
rajdanta amazono!



Por infanoj



AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Kvina ĉapitro

La du geknaboj atente aŭskultis la oĉjon Karlo. Intertempe envenis la hundeto. Ĝi amikeme vostumis. Kristinjo gaje ekkriis:

-Ĝi estas nia savanto. Ĉi hundeto gvidis nin al oĉjo. Dank' al ĝi!

Ankaŭ Peĉjo karesis la hundeton, kiu feliĉe saltadis.

-Ĝi estas mia vagabonda besteto. Efektive ĝi estas tre helpema. Ĝi ankoraŭ estis ido, kiam mi ricevis ĝin de mia bona amiko – diris ridetante la oĉjo Karlo – Komence ĝi estis tre petolema besto. Ofte ĝi ŝtelis miajn pantoflojn. En iu mateno mi ne trovis ilin. Mi rensversis la tutan domon pro ili. Ĉu vi deziras scii, kie ili estis?

-Jes – respondis samtempe la geknaboj – Bonvolu rakonti al mi!

-Ĝi jam estis ĉe mi de post tri aŭ kvar tagoj. Ĝi loĝis en la ĉambro kun mi. Mi faris por mia hundeto kuŝejon en granda skatolo. Mi enlitigis ĝin kaj mi pensis, ke ĝi pasigos la nokton silente kaj trankvile.

Mi rapide endormiĝis, ĉar dum la tuta tago mi laboris en la ĝardeno, mi fosis kaj pioĉis. Posttagmeze mi farbis la kameron. Do, mi estis ege laca kaj mi deziris trankvilon.

Mi ne sciis, kioma horo estis. Eble jam pasis noktomezo kaj subite mi aŭdis strangajn bruojn. Sed mi estis tiom laca, ke mi ne emis ellitiĝi por kontroli kio okazis?

Kelkajn minutojn mi aŭskultis la strangajn bruojn kaj mi endormiĝis denove. Mi dormis ĝis mateno. Kiam ektintis la vekhorloĝo mi elsaltis el la lito. Mi tuj volis uzi miajn pantoflojn, sed ili malaperis. Vane mi serĉis ilin sub la lito. Miaj pantofloj estis nenie. Tiam ankoraŭ mi esperis, ke mi lasis ilin en la banĉambro pro la lacego mi iris vespere al la lito nudpiede. Sed la pantofloj ne estis en la banĉambro, eĉ ili ne estis en la tuta domo.



-Kie estis la pantofloj? – demandis scivole Kristinjo kaj sur ŝia vizaĝo estis videbla, ke ŝi jam tre volas ekscii, kie estis la pantofloj de la oĉjo Karlo.

-Karaj miaj, tuj vi ekscias – diris la viro – mi iris al la skatolo. Mia hundeto trankvile dormis en ĝi.

Mi eliris el la domo kaj mi serĉis ilin tie. Mia najbaro ridante demandis:

-Najbaro, kion vi serĉas?

Unue hontis konfesi, ke nokte miaj pantofloj perdiĝis, sed fine mi elbuŝigis:

-Mi ne trovas miajn pantoflojn. Nokte ili perdiĝis. Mi ne scias, kie ili estas.

Mi ne komprenis, la najbaro kial priridas min kaj fine post kelkaj minutoj, kiam mi jam volis lasi lin por ke mi plu serĉu la pantoflojn, kiam li eklevis sian manon per ĝi prenante la pantoflojn.

-Ĉu vi serĉas ilin?



-Jes. Kie vi trovis ilin? – mi demandis.

-Certe via hundeto ŝtelis ilin kaj portis en mian ĝardenon. Ambaŭ pantofloj estis sub la rozarbusto. Unue mi ne sciis, kio ili estas?

-Ho, tiu damnita hundido! – mi ekkriis – Nokte mi aŭdis strangajn bruojn, sed mi ne pensis, ke ĝi estas la ŝtelisto.

Peĉjo kaj Kristinjo laŭte ekridis, ĉar al ili tre plaĉis la rakonto pri la hundo

Ĝi gvidis ilin al la bonkora kaj helpema onklo, kiu volonte helpis al ili.

Antaŭtagmeze ili admiris la admirindan ĝardenon de la oĉjo Karlo. En ĝi estis multe da belaj floroj kaj interesaj kreskaĵoj. Ili senĉese scivolematis pri la diversaj plantoj.

La maljunulo estis grandioza kaj sperta ĝardenisto. Ĉion li mem faris en la ĝardeno.

Post la longa rigardado ili ekripozis sub granda, ombra arbo.



Se oni fartas bone, tiam la tempo pasas fulmrapide kaj alvenis la tempo de la adiaŭado. La du knaboj devis reiri al la lernejo kun la instruistino. Ili dankis la gastamon de la oĉjo Karlo kaj promesis, ke ankoraŭ ili vizitos la maljunulon.

(daŭrigota)

Gajaj bildoj




-Ĉu vi estas la membro de Pasporta Servo?

Gajaj bildoj



-Kara mia, hodiaŭ la fiŝvendejo estas fermita



El ĝi fariĝos sperta esperantisto!



-Mia bopatrino estas pli drakona



Ĝi alŝutas



Paca, familia idilio